# Francisko FERRER



ENHAVO


*1. Francisko FERRER (Andreo LORULOT)*
*3. Antaŭ... 90 jaroj (Andreo CAUBEL)*
*9. La Pledo por FERRER (GALCERAN FERRER)*

# Francisko FERRER

Francisko FERRER estas unu el la plej noblaj figuroj de la internacia socia movado.

Simpla profesoro, li iam ricevis heredaĵon kaj tuj dediĉis ĝin al la fondado de lernejo. Sindikatisto kaj liberecana aktivulo, li komprenas ke la popola edukado konsistigu la neŝanceleblan fundamenton de la emancipo. Nenion daŭropovan oni povas krei kun malkleruloj. En tiu malfeliĉa Hispanio, kiun prirabis la monaĥoj kaj la grandsinjoroj, oni nombris 65% da analfabetoj kaj la laborista klaso (precipe la virinoj) estis tute submetita al la religia fanatikismo. Tial la « Moderna Lernejo » estis esence laika kreaĵo, en kiu oni donis raciisman instruadon, sen dogmoj kaj sen antaŭjugoj. Tiu provo ege sukcesis ; en kelkaj jaroj, 52 filioj malfermiĝis tra Hispanio. Tiam ektimis la Jezuitaro, kaj strebis kompromiti Ferrer-on, lin akuzante pri kompliceco en atenco kontraŭ la reĝo.

Liberpensa festo okazis la 12an de aprilo 1906 (la t.n. sanktan Vendredon). Ĝin partoprenis 1700 lernantoj el la raciismaj lernejoj. La katolika kolero senbridiĝis kaj oni urĝe, unu monaton poste, profitis aperantan okazon por ataki Ferrer-on.

Fakte, la 21an de majo 1906, al Alfonso la XIII-a ĵetis bombon Matteo Moral, kiu, tri jarojn antaŭ la atenco, estis dungita de la « Moderna Lernejo » kiel bibliotekisto kaj tradukisto. Ne necesis pli por plej arbitre impliki Ferrer-on en la persekutadoj. La Lernejon oni fermigis : ĝi neniam plu remalfermiĝos. Venkis la Jezuitaro.

Tamen, post dek tri monatoj da karcero, kaj spite al la partieca sinteno de la Justico, endis liberigi Ferrer-on. La pedagogia verko, interrompita pro la fermo de la Moderna Lernejo estis tuj trovonta novan formon.

Efektive, pli ol iam Ferrer estis konvinkita pri la urĝeco de popola edukado. Apenaŭ liberigite, li skribis : « La registara sinteno pruvas al ni, ke ni pravas serĉi la homan emancipon per edukado, nur per edukado. Se ni ne estus jam de longe konvinkitaj pri tio, sufiĉus vidi kiel rabie ni estas persekutataj, kaj la tutan profiton, kiun havas la reakciularo, senkreditigante nian instrusistemon, por kuraĝigi nin sur la vojo, kiun ni elektis. »

Ne povante remalfermi sian Lernejon, Ferrer fondis eldonejon kaj librejon, celante disvastigi en Hispanio la verkojn de la grandaj filozofoj kaj de la scienculoj. Diskonigante la skribaĵojn de Darwin, Elizeo Reclus, Letourneau k.a., ankoraŭ edukadon li celis. Sed gvatis la reĝa potenco kaj la Eklezio…

En 1909, dum la milito en Maroko, okazis en Barcelono kelkaj ribeloj. Tuj oni arestas Ferrer-on, kiu efektive ne troviĝis en la urbo kaj oni mortpafas lin post pseŭdo-proceso, sen atestantoj kaj sen pruvoj. En la tuta mondo grandega estis la indigno. La vesperon mem, la 11an de oktobro, granda manifestacio okazis en Parizo antaŭ la hispana ambasado. Similaj manifestacioj okazis en la plimultaj landoj.

Andreo **LORULOT**

el « Historio de la tutmonda Socialismo », eldonita de « L'Idée Libre » (Libera Ideo), 1945, elfrancigis Kribo.

Noto de la trad. : Francisko Ferrer estis rehabilitita en 1912.

# *Antaŭ ...90 jaroj*

*Antaŭ 90 jaroj*, okazis en la sama jaro 1909 kaj en la sama urbo Barcelono tri eventoj, kiuj meritas rememorigon : popola ribelo, esperanto-kongreso kaj ekzekuto, post hontinda proceso, de eduk-isto Francisko FERRER.*

*En tiu tempo, la hispana armeo batalis trans la Mediteraneo kontraŭ islamaj nordafrikanoj. Malsukceso apud Melila igis la registaron dekreti, la 10an de junio, revokon de rezervsoldatoj. En tiu tempo facile ekflamis la popolo, kiam ĝi konsciis pri maljustaj koloniaj luktoj. En tiu kazo, la koloniaj interesoj estis plumbminejoj. Ĉe la unuaj enŝipiĝoj de rezervanoj, la 18an, okazas manifestacioj ; la registaro decidas subpremi ĉian agiton, ordonas « sieĝostaton », sed la malkontento kreskas. La episkopo opinias oportune, afiŝi « **Novan Krucmiliton kontraŭ Lunarko**... ». La instinkto de la kataluna popolo bone montris al ĝi la verajn registojn, jam en tiu tempo, de Hispanio : ĝia furiozo sin turnas al preĝejoj kaj monaĥejoj kaj ekbruligas 50 da ili. Ĝenerala striko, kaj fine vera ribelo, atingas la paroksismon la 27an kaj la 28an de junio, la « ruĝaj tagoj »... La kolero de la popolo trafis preskaŭ nur monumentojn, apenaŭ okazis atencoj kontraŭ personoj. Sed la revenĝo estas senkompata : 270 kadavroj kuŝas ĉe la barikadoj ; arestoj kaj arestoj...*

*La Kvina Universala Kongreso de Esperanto estis okazonta de la 5a ĝis la 11a de septembro, kun ĉiuj oficialaj benoj, eĉ de Lia Reĝa Moŝto. Oni eĉ esperis - miraĝo ! – Lian ĉeeston ! Kiel antaŭgvardio Bourlet kaj de Ménil vizitis la urbon en majo, kaj longe raportis pri la aranĝoj – 22 densaj paĝoj de **La Revuo** -, en « neimageble varmega » entuziasmo... Jam en tiu tempo oni ne povis imagi hispanian esperanto-kongreson sen almenaŭ du mesoj. Oni legu sub la plumo de liberpensulo Bourlet la ditirambojn (p.513) pri « alia tre karakteriza meso » farota « sur kamparo en plena aero kun ĉeesto de militistoj » : « Mi jam vidas la imponantan spektaklon de la pastro prezentanta la sanktan kalikon ĉe l' ofero, dum*

*tintas la klingoj de la sabroj kaj sonas la trumpetoj en la silenta radianta naturo »... Sed, ho ve ! pro la eventoj, oni « neŭtraligos » la kongreson, senigante ĝin je tiom bela programero !*

*La organiza komitato de la kongreso do devas fronti malfacilajn problemojn post la ribelego. Ĝi proklamas al la esp-istaro, per dikaj literoj : «* ***Barcelono kuŝas ankoraŭ apud la Mediteraneo*** *». En iom ŝoke ŝerca artikolo, la prezidanto Pujulá asertas, ke « pli granda ol neniam estas la sekureco kaj la trankvilo », kaj promesas levon de la sieĝa stato, kiu cetere « estas ne simila al la sieĝaj statoj de aliaj landoj ». Fine tamen la kongreso okazas. Efektive « regas ordo »... kaj sieĝostato ne leviĝis. « Armitaj kavaliroj** ankoraŭ rajdis en la stratoj » skribas Privat.*

*Mi devas konfesi mian scivolemon pri multaj aspektoj de la Barcelona kongreso ; mi volus scii kiugrade la sociaj okazaĵoj influis al ĝi. Sed la dokumentoj estas diskretaj. Ekzemple Privat nur aludas en sia «* ***Vivo de Zamenhof*** *» kaj tute silentas en «* ***Historio de Esperanto*** *». Pluraj demandopunktoj staras senresponde en la oficialaj dokumentoj kaj en la raportoj, kiujn mi povis legi. Kiom* ***ĉeestis*** *el la 1287 aliĝintoj ? (Ne fidu la diversajn fontojn, kiuj malavare nombras ĝis 1500, eĉ ĉeestantojn ! La jarlibro de UEA tekstis 1300 « anoj » ĝis 1956, sed ŝvelis ĝis 1500 de 1957). Kiom ĉeestis el la 3000 barcelonaj esp-istoj (nombro laŭ Pujulá en la Oficiala Protokolaro) ?*

*Oni miras, ke en letero de la 3-7-1909 (publikigita en la* ***Nica Literatura Revuo****, sept. 1959), Zamenhof, kiu intencis ne partopreni, sed tamen fine vojaĝos Barcelonon, tute ne aludas pri la sangaj tagoj. Oni miras pro la alvoko al la hispana reĝo, kiun Bourlet enŝovis en sian raporton : « Vi faru nur tiajn homamajn agojn, tiajn noblajn gestojn. » (****La Revuo****, novembro 1909, p.124) ; ĝi tenus tute malsaman signifon laŭ la epoko de ĝia verkado,* ***antaŭ*** *kaj* ***post*** *la ekzekuto de Ferrer.*

*Tiu raporto de Bourlet entenas kaj neseriozajn troigojn (« la urbanoj, rekuraĝigitaj, reprenis sian viglecon »... pro la kongreso !), kaj simptomajn detalojn (la ne tro ĝentila akcepto de la civila*

*guberniestro), kaj zorge cenzuritajn informojn : rakontante la presistan kunvenon, pri kiu raportas la Oficiala Dokumentaro detale, S-ro Bourlet tute kastras ĝin, ignorante la* ***porlaboristajn*** *deklarojn de Zamenhof !*

*Nur diveni oni povas, ke Zamenhof sin limigis en sia parolado al la kongreso, ke lia deklaro al la presistoj-laboristoj estas des pli kuraĝa. La kongreso okazis en cirkonstancoj multe pli malfacilaj ol ekz. tiu de Kolonjo en 1933. Ni esperu, ke iu el la vivantaj ĉeestintoj iam priskribos sincere kaj senkaŝe pri la barcelona etoso en septembro 1909...*

*Evidenta deziro, sin ne kompromiti, klarigas ke restas ankaŭ demandopunktoj pri la rilatoj de Ferero kun esperanto, kaj speciale kun la barcelona kongreso. Cetere, kiam oni komparas la biografiojn de la mortpafito de la 13-10-1909, oni konstatas malakordojn. Ekz. pri la dato de lia aresto (31-8-1909, kelkajn tag-ojn antaŭ la esp-kongreso), mi povis legi : 20-8, 13-9 (Privat : « du tagojn post la fino de la kongreso ». Male eraras Waringhien,* ***Le-teroj****, II, 250, aludante la mortpafon antaŭ la kongreso).*

*Eĉ la numero 655 (decembro 1959) de* ***Sennaciulo*** *konfuzas : la bombo de 1906 eksplodis en la calle Mayor en Madrido ; tiam Fe-rero sin mem liveris kaj estis absolvita, post preskaŭ unu jaro en la « Modela Malliberejo » ; en 1909, li sin kaŝis – pro sperto – kaj estis arestata.*

*La rekordon de la misinformoj pri Ferero posedas sendube la plej uzata enciklopedia franca vortaro, kiu en 8 linioj sumas 6 erarojn. La 3 plej gravaj estas nomi lin « hispana revoluciisto », aserti ke li « malfermis Revoluciulan Instituton » kaj ke li « partoprenis la Barcelonan ribelon ». Fakte Ferero estis ĉefe edukisto : li aŭtodidakte sin instruis, precipe en la Pariza Nacia Biblioteko ĉar li vivis en Parizo de 1886 (jam en tiu tempo Hispanoj devis rifuĝi en Francion...) ; li iĝis libera instruisto ; li eĉ iniciatis en sia lernolibro pri hispana lingvo la lingvoinstruon per familiaraj dialogoj ; li fondis pedagogiajn organizaĵojn (la instituto :* ***La Moderna Lernejo****, la firmo* ***Eldona*** *por presigi lernolibrojn, la*

revuo : **Renovigita Lernejo**, la **Internacia Ligo por racia edukado de la infanaro**), *ja revoluciajn en siaj principoj kaj metodoj, sed tute ne celantajn formi revoluciistojn : ni ne ludu per la franca vorto* **révolutionnaire** *!*

*Sed ankaŭ en tiu tempo ekzistis fanatikaj malamikoj de laika lernejo. Baldaŭ post la sangaj tagoj en Barcelono, episkopo Casanas denuncas la « sendian lernejon ». Kaj iom post iom, pli kaj pli senkaŝe la katolika gazetaro (sp.* **La Universo**) *akuzas Fereron, ke li kulpas pri la organizo kaj la gvidado de la ribelo. Iliajn akuzojn eĥos post la afero la gazetisto franca Moras' (Maurras) : « Mi ne kredas, ke Ferero rekte partoprenis en la Barcelonaj ribeloj, sed pri ili li estas* **morale respondeca**, *ĉar lia propagando celis renversi la establitan ordon. » Fereron oni arestas ; enketo por juĝo antaŭ la militista tribunalo okazas en septembro, jen stulta (oni legis :* **Triumfo de la dinamito** *anstataŭ la titolo de sciencaĵo : « Triumfo de la atoma dinamismo » !) jen ege senjusta : neniuj atestantoj, advokato nur la 3an de oktobro. La proceso estos ankoraŭ pli maljusta : la advokato ricevas la 600-paĝan dosieron nur la 8an vespere, kaj la kunsido okazos la 9an ! Oni* **legas** *la atestojn... La ĉefan atestinton oni enŝipigas el Argentinio... la prezidanto donas la parolon al la defendanto per tiuj vortoj : « Ne tro longe ! »...*

*Malgraŭ protestoj el la tuta mondo, la parodio de proceso finiĝas, la verdikto estas komunikata al Madrido por ratifo, la ministroj hezitas, la reĝo silentas, sed oni aranĝas ĉion por likvido antaŭ la kunsido de la parlamento (15-10)... La 12an vespere, oni kondukas Fereron en la kapelon de Montjuich kaj liveras lin al 8 eklezioloj, al kies predikoj li rezistas. Dum ses horoj li diktas al notario testamenton, kiu entenas belajn filozofiajn paĝojn. Kaj matene li estas fine liverata al la ekzekutroto. Antaŭ la fusiloj li krias : « Vivu la Moderna Lernejo ! »*

*Kompreneble, Ferero ne restis fremda al la afero de Lingvo Internacia kaj ne povis ignori esperanton. Laŭ indikoj donitaj de nia veterana kdo Yelland en Dortmundo al kdo Weichmann, kaj kiujn aperigas la n-ro 14 de* **Nia Libera Opinio**, *Ferero estis membro de*

*« Libera Penso », asocio de la esperantistaj liberpensuloj, fondita en 1907. « **Libera Penso** » publikigis, laŭ sama fonto, « la mem-defendan paroladon de Ferrer, kiun li faris antaŭ la militista tribu-nalo » ; sed mi legis, ke Ferero aldonis nur kelkajn vortojn al la defendo de sia advokato, kapitano Galceran. Kion opinii ? ****

*Kion opinii ankaŭ pri la indikoj, kiujn donas la propra filino de Ferero, Sol, en sia biografio « **La vera F. Ferrer** », Parizo, 1948 ? P. 166, ŝi aludas, ĉ. 1908, patronadon petatan de Archdeacon al Ferero por iu « Komitato por disvastigo de esp-o » - probable SFPE. P.205, rakontante la areston de Ferero, frue en la mateno, de la helpĝendarmoj : « Ferero eltiras el sia biletujo kunvokilon al la Esp-Kongreso, kiu okazos la morgaŭon en Barcelono – Vi tien iras ja frue ! » Jes, la ĝendarmoj povas miri, la 31an je la 5a matene, ĉar la malfermo de la kongreso okazos nur la 5an de septembro. Ankaŭ ni povas miri, ĉar ne ekzistas vere kunvokiloj por kongresoj... En la libro de Sol Ferrer oni povas konstati cetere kelkajn erarojn pri faktoj.*

*Kiu diros al ni precize la rilatojn inter la tri aluditaj barcelonaj **ribelo, kongreso** kaj **Ferero** ?*

*André* ***CAUBEL***

* Aperinte en « SAT-Amikaro » de januaro 1960, la originalo efektive tekstas « 50 jaroj » (Noto de red. de L !)

** Oni prefere diru : *kavalerianoj* (Noto de la aŭtoro).

*** En malnova katalogo mi ĵus konstatis, ke temas fakte pri la pledo de la defendinto, kiu nomiĝis **José Galceran y Ferrer**. (Noto de la aŭtoro). Tiun pledon ni ĉi-poste represas. (Noto de red. de L !)